## Sciencaj programoj furoris en Burno, Kaŭno kaj Salsomaggiore

*Kiel kutime okazis en la 110-a UK en Burno riĉa kaj abunda scienca programo, konsistanta el 19 prelegoj kaj pliaj programeroj, i.a. novaj "Sciencaj Konkursoj" de Akademio Insternacia de la Sciencoj (AIS) kaj la Faka Forumo. Ankaŭ abundis la programo de la Sciencaj Universitataj Sesioj de AIS dum la Baltiaj E-tagoj okazinta en Kaŭno, Litovio, komence de julio, kaj riĉa scienca programo atendas la partoprenantojn de la Itala Kongreso fine de aŭgusto.*

### Premioj Pirlot kaj Charles Power por sciencaj libroj kaj prelegoj

Dum la UK estis anoncitaj la rezultoj de konkursoj en tri sciencaj branĉoj (Gazetara Komuniko: https://uea.org/aktuale/komunikoj/2025/Rezultoj-de-la-sciencaj-konkursoj-Pirlot-kaj-Power-kaj-la-scienca-programo-dum-la-110-a-UK ), kiujn oni povas komune nomi "Sciencaj Konkursoj", simile al la Belartaj Konkursoj. Dum la Scienca Forumo okazinta kadre de la UK estis disdonitaj la Premio Pirlot (por la plej bonaj sciencaj libroj) kaj la nova Premio Charles Power (por la plej bonaj sciencaj prelegoj). La konkurso por Premio Pirlot estis organizita de AIS inter 1994-2001 kaj post longa interrompo denove ekde 2017. Nun aldoniĝis la nova Premio Power. Ambaŭ premioj estis unuafoje disdonitaj sub la aŭspicio de UEA. La premio-atestojn prezentis al la gajnintoj dum la Scienca Forumo en Burno Aleks Kadar, Ĝenerala Sekretario de UEA, kune kun Bengt-Arne Wickström, trezoristo de AIS, kaj Vera Barandovská-Frank, la IKU-rektoro. La du lastaj servis ankaŭ kiel la ĵurio por la Premio Power, kune kun Carlos Spinola. La ĵurio por la Premio Pirlot konsistis kiel an la antaŭaj jaroj, el Carlo Minnaja, Hans-Michael Maitzen kaj aldoniĝis Bengt-Arne Wickström, kiu anstataŭis Renato Corsetti.

La gajnintaj verkoj elektitaj de la ĵurio por la *Premio Pirlot* (sciencaj libroj) estis:

- Unua loko: *Astronomio kaj Astrofiziko por ĉiuj*, Amri Wandel kaj Carlos Spinola;
- Dua loko: la IKU-libro 2025, red. A. Striganova, D. Shevchenko kaj A. Wandel;
- Tria loko: *La Rivoluoj de la Ĉielaj Korpoj*, trad. Reinhard Foessmeier kaj Hans-Michael Maitzen.

La *Premio Power* estis aljuĝita en du kategorioj: longaj prelegoj (kiel IKU) kaj mallongaj prelegoj (kiel Scienca Kafejo).

Premio Power (longa scienca prelego):

- Unua loko: *La teknologio de Spacvojaĝado kaj Esplorado*, Amri Wandel;
- Dua loko: *La ambigueco de Nombroinformo*, Ekaterina Bebenina;
- Tria loko: *Multlingva temvortaro helpata per AI*, Ilona Koutny.

Premio Power (mallonga scienca prelego):

- Unua loko: *Gergor Mendel*, Judith Jackson;
- Dua loko: *Knabeto Savita de Auschvitz*, Thomas Bormann;
- Tria loko: *Arkivistiko kaj Esperanto*, Ruben Fernandez.

### IKU-prelegoj kaj AIS-atestoj

La 78-an sesion de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) prezentis dum la UK-inaŭguro ĝia rektoro, Veran Barandovska-Frank. Raportis pri la scienca programo dum la fermo de la UK A.

Wandel. Entute okazis 19 prelegoj: ok IKU-prelegoj (la naŭa, pri Ebola, ne okazis pro teknika kialo, sed registraĵo estos eventuale prezentita dum la Virtuala Kongreso). Tri daŭrigaj prelegoj kadre de la komuna IKU-AIS sesio, kaj ok prelegoj de la Scienca Kafejo. Ĉiuj prelegoj estis registritaj. En la tri IKU-AIS kursoj partoprenis po 100-145 kongresanoj kaj en la cetereaj prelegoj po 60-100. La temoj ege variis, eble eĉ pli ol kutime: Matematiko, Lingvistiko, Spacteknologio, tri prelegoj temis pri Historio, Arkitekturo, Literaturo, Medicino, Lingvopolitiko, Kemio, Arkivistiko, Fiziko, Daŭripovo, Dum la Scienca Forumo estis publike disdonitaj la atestoj por du IKU-AIS-kursoj, en kiuj okazis ekzamenoj: tri atestoj en la kurso *La ambigueco de Nombroinformo* de E. Bebenina, kaj 31 atestoj en la kurso *La teknologio de Spacvojaĝado kaj Esplorado* de A. Wandel. Detalaj informoj pri la scienca programo aperis en la Kongresa Libro kaj en la Kuriero https://uk.esperanto.net/2025/kuriero (n-roj 6 kaj 7).

**Rekorede ampleksa IKU-libro**

La abunda scienca programo spronis rekorde ampleksan IKU-libron de 330 paĝoj, kiu enhavas ankaŭ kvar tekstojn de la 41-a Scienca Universitata Sesio de AIS okazinta komence de julio dum la Baltiaj E-tagoj en Kaŭno. Ankaŭ aperis aparta kolora broŝuro de la kurso "Spacvojaĝado kaj Esplorado". Kiel ĉiam, ĉiuj prelegoj en la IKU-libro havas resumojn en la angla, franca kaj, kiel loka lingvo, la ĉeĥa. Aprezis tion la reprezentanto de la urbestrino, kiu ricevis ekzempleron de la IKU-libro dum la urba akcepto, kun klarigo pri la ĉehdevena rektoro kaj la ĉehlingvaj resumoj. La apuda diagramo montras la evoluon de la IKU-libroj, ekde la modesta broŝuro kunmetita de Lee Chong Yeong kaj A. Wandel en 1997 ĝis la ĉi-jara ampleksa libro. La IKU-libro aperis ĉiujare, unue broŝurforme kaj ekde 2017 libroforme. Diĝitaj versioj de la IKU-libro estas haveblaj en la IKU-retejo https://uea.org/kongresoj/universitato ekde 2005, kaj por la jaroj 1998 kaj 2002.

[diagramo evoluo de la IKU-libro 1997-2025]

**Faka Forumo, Aŭkcio kaj Stelobservado**

Ĵaŭde posttagmeze dum la UK prezentis sin pli ol 30 fakaj asocioj en la Faka Forumo, kunordigita de A. Wandel. I.a. prezenris po ĉ. 3 minutoj reprezentantoj de IKUE, ATEO, SAT, EDE, IKEF, BEL, VS, IFEF, TADEN, Esperanto plus, Espermensa, Budhana Ligo E-ista, LSG, UMEA, ILEI, BEMI, Uanbulismo, Rotario, TAKE. La forumo daŭris unu horon kaj duonon kaj estis registrita. Interalie oni diskutis rilatajn temojn, kiel la planitan Almanakon de UEA (Kadar) kaj la revigligon de ISAE (Wandel).

En la Aŭkcio de la 110-a UK, kiu sekvis la Sciencan Forumon, estis venditaj pluraj objektoj rilataj al sciencaj verkoj kaj rezultoj. Kiel ĉiam estis aŭkciita la IKU-libro kun la subskriboj de ĉiuj ĉeestantaj prelegintoj. Aldone, unuafoje estis aŭkciitaj la gajnintaj libroj de la Premio Pirlot, kaj stampitaj atestoj de la Premio Power. Fine oni ofertis la historian helblu-blankan kravaton de AIS.

Nekutima elemento de la scienca programo de la UK estis la ekskurso E8, okazinta merkrede vespere, en la nova planetario de Burno. La 140 partoprenintoj ĝuis specialan 40-minutan 3-D-programon *La Universo per ĉiuj sencoj*, kun E-tradukado zorge preparita de la Loka Kongresa Komitato, kaj prelegon pri la historio de astronomio fare de A. Wandel, kiu sekve gvidis virtualan viziton de la nokta ĉielo helpe de la plej novaj rimedoj de la planetario. Pliaj fotoj de John Huang en https://www.facebook.com/john.huang.6868/posts/10171852859900276

[foto:
https://www.facebook.com/photo?fbid=10171852841625276&set=pcb.10171852859900276

**La Esperantologia Konferenco**

La 47-an Esperantologian Konferencon, okazintan ĵaŭde dum la UK, organizis Klaus Schubert kaj Bengt-Arne Wickström, nome de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Fakuloj kaj interesatoj pri Esperantologio, Interlingvistiko, lingvosciencoj kaj la mondaj lingvaj problemoj kunvenis la tutan tagon. Oni aŭskultis ok altnivelajn prelegojn pri arkivoj de esperantaĵoj, uzo de Esperanto en la familio kaj en la mondo en epoko de artefarita intelekto, kontaktlingvistiko kaj propedeŭtiko rilate al Esperanto kaj la gramatiko kaj la interna ideo de la lingvo. Partoprenis ĉ. 50 personoj, multaj faris demandojn kaj proponojn. La konferencon fermis ĝenerala diskuto pri interlingvistiko kaj mondaj lingvaj problemoj. Oni ankaŭ pritraktis la statuson kaj futurajn eblecojn de interlingvistiko en universitatoj ĉirkaŭ la mondo.

**La 41-a Scienca Universitata Sesio dum BET**

Jam la trian fojon la Scienca Universitata Sesio (SUS) de AIS okazis kadre de Baltiaj E-Tagoj (BET) ĉi-jare okazinta en Kaŭno, Litovio. Raporto videblas en "Kunfluo", la BET-kuriero http://www.esperanto.lt/board/data/bet59/kunfluo_nro7.pdf. Estis ofertitaj du kursoj: pri kulturo (Ilona Koutny) kaj astrofiziko (Amri Wandel), kaj du prelegoj: pri astronomio (Carlos Spinola) kaj vitaminoj (Ite Tytgat). Fine de la kurso pri astrofiziko okazis kiel kutime ekzameneto kiun partoprenis 25 personoj. La partoprenintoj ricevis AIS-atestojn dum la BET-fermo. Aldone okazis dum BET pluraj prelegoj de la Somera Universitato kaj kurso de Mark Fettes *Lingvo kaj mondo,* elŝutebla ĉe https://www.researchgate.net/publication/ 393554289_Lingvo_kaj_mondo. Por la BET estis preparitaj speciala eldono de la IKU-libro, kaj nova libro *Astronomio kaj Astrofiziko por ĉiuj*, kunverkita de A. Wandel kaj C. Spinola, kiu enhavas detalajn tekstojn de la SUS-prelegoj de ambaŭ aŭtoroj kaj kolorajn ilustraĵojn.

**Esperanto: bona lingvo por scienco, kaj SUS-42 dum la Itala Kongreso**

Dum la Itala E-Kongreso en Salsomaggiore Terme okazos fine de aŭgusto la 42-a sesio de SUS, kunlige kun la kongresa temo "Esperanto: bona lingvo por Scienco" kiun reĝisoros A. Wandel. Kadre de SUS okazos en la programo ( https://kongreso.esperanto.it/91/programo/ ) du kursoj: *Astronomio por scivolemuloj* (A. Wandel), kaj Ĵurnalismo *kaj Artefarita Intelekto* (Massimo Ripani), kaj ses sciencaj prelegoj: *Ĉu la scienco estas vere internacia? Ĉu ni bezonas internacian lingvon por internacia scienco?* (Carlo Nicola Colacino), *Lingva justeco kaj scienca komunikado* (Michele Gazzola), *Operacia Esploro: Optimumi en Mondo de Kompleksecо* (Luca Coslovich), Malagasujo, interesa lando (Ulrich Matthias kaj Miora Raveloharison; rete), *La t.n. politikaj arĥitekturoj* (Ana Alebić Juretić), kaj *Debato pri prestiĝo de Esperanto* (Aleksander Zdechlik). Pri la kongresa temo okazos ĉiutage tri hora seminario, kun partopreno de Carlo Nicola Colacino (dimanĉe), Alessandra Madela (lunde), Massimo Ripani (marde) kaj aliaj. Jaŭde kaj Vendrede Wandel gvidos debton kaj prelegojn pri la subtemoj Esperanto en

lingve-rilataj sciencoj (Esperantologio, lingvistiko, artefaritaj lingvoj, Esperanto kiel denaska lingvo, plurlingva edukado de infanoj), Scienco per Esperanto (Originalaj kaj tradukitaj esploroj, terminologio), Sciencrilataj E-asocioj kaj instancoj (ISAE, AIS, IKU, KAEST, STEB), Scienca eldonado en Esperanto, Esperanto kiel ponto-lingvo en internaciaj sciencaj konfenecoj kaj esploroj, Esperanto kiel esplor-lingvo.

**Plura jubileoj kaj la estonteco de IKU kaj AIS**

2025 estas la cent-jara jubileo de IKU, kies unua sesio (kun la nomo Internacia Somera Universitato) okazis en Ĝenevo, 1925. La ĉi-jara IKU-sesio markas ankaŭ mian 30-jaran prizorgadon de IKU kaj la sciencan agadon de UEA, el ili preskaŭ 20 kiel IKU-sektetario. En 1995, kiel nova estrarano de UEA pri Scienca kaj Faka Agado, mi iniciatis la kunlaboron kun AIS, ekde kiam regule okazis la komunaj IKU-AIS-sesioj. Aldone, ĉi-jare IKU markas dek-jaran datrevenon de la Scienca Kafejo, kiun mi enkondukis en 2015 en Lillo.

Antaŭ ses jaroj mi refoje ekservis en la estraro de UEA, kaj plu evoluigis IKU kaj la sciencan programon dum la Universalaj Kongresoj kaj lastatempe dum la Virtualaj Kongresoj. Mi ankaŭ progresigis la sciencan eldonadon en Esperanto, aparte la IKU-libron. Tamen, en Burno mi ne estis elektita por la estraro, sekve venas nun tempo por la novaj estraranoj daŭrigi mian laboron pri IKU kaj scienco en UEA.

Tiuj ŝanĝoj tamen ebligos pli intensan konstruon de AIS, kies prezidanto mi plu restas. Plurajn paŝojn en tiun direkton mi jam komencis, kiel renovigo de la AIS-retejo http://www.ais-sanmarino.org/index.html, daŭrigo de Premio Pirlot kaj iniciato de la nova Premio Power. Dum la Scienca Forumo de la burna UK okazis Ĝenerala Asembleo de AIS, kaj aliĝis pluraj novaj membroj. Ĉi jare unuafoje okazas du SUS-oj samjare, kiuj kune kun la komuna IKU-AIS sesio en Burno kreas sinsekvon de tri AIS-sciencaj semajnoj ene de du monatoj. Espereble tiu ritmo povos daŭri en la estonteco.